

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ helmikuu ♦ februaro 1/2026



Vintraj Tagoj de EAF
7.-8.3.2026 en Salo, p. 9-11

- ♦ Somera kurso 4.-7.6.2026 Raisio, p. 12
- ♦ Peto de svisa studento Oscar Pasche, p. 13
- Lingva Angulo 2 de Jouko Lindstedt, p. 14

Suomen Esperantoliitto ry:n

äänenkannattaja ja tiedotuslehti.

Organ för Esperantoförbundet i Finland.

Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Tekstit ja kuvat lainattavissa Suomen Esperantoliiton (EAF) tai tekijän luvalla. Lähde mainittava. För att använda verket behövs tillstånd av Esperantoförbundet (EAF) eller av upphovspersonen. Källan ska anges.
Tekstojn kaj bildojn oni rajtas reuzi nur kun permeso de la redakcio (EAF) aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

Kansikuva/Pärmfoto/Kovrilbildo:

La rivero en Salo. Salojoki.

Foto: Onni Kauppinen.

SISÄLTÖ/INNEHÅLL/ENHAVO:

Puheenjohtajalta – De la prezidanto . . .	3–4
Liitto tiedottaa, EAF informas	5
Pri justo kaj modero	6
Esperanto-klubo de Helsinki informas . . .	6
Esperantogrupu en Oulu informas	7
Esperanto-societo en Turku informas . . .	7
Esperanto-societo Antaŭen informas	8
La kultura ĉefurbo de Eŭropo 2026 Oulu	8
Vintraĵ Tagoj, Talvipäivät Salo	9–11
Somera kurso 4.–7.6.2026 Raisio	12
Peto de svisa studento Oscar Pasche . . .	13
Lingva Angulo 2 de Jouko Lindstedt . . .	14
Liiton hallitus ja jäsenjärjestöt	15
Vintra vizito en Somero	16

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/

Redakta grupo:

eaf@esperanto.fi

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/

Respondeca redaktoro: Juha Metsäkalas

Toimitussihteeri/Redaktionssekreterare/

Redakta sekretario: Tiina Oittinen

Taitto/Layout/Enpaĝigo: Maj-Lis Krouvi,

maj-lis@maisapaja.info

www.esperanto.fi

www.facebook.com/Finnlando

Liity Suomen Esperantoliiton jäseneksi.

Henkilöjäsenen jäsenmaksu vuonna 2025 on 25 €/vuosi ja siihen sisältyy Esperantolehti. Vuosikokous maaliskuussa määrittää vuoden 2026 jäsenmaksun. Voit liittyä jäseneksi myös jonkin paikallisen jäsenyhdistyksen kautta, ks tarkemmin sivu 15. Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti myös liiton jäseniä. Kaikki liiton jäsenet ovat myös Esperanton maailmanjärjestö UEA:n liitännäisjäseniä (*aligitaj membroj*).

Uudet jäsenet saavat liittymislahjaksi kirjan *Tohtori Zamenhof ja kansainvälinen kieli.*

Ota yhteyttä liiton sihteeriin sähköpostin *eaf@esperanto.fi* kautta niin saat linkin liittymislomakkeelle ja lisätietoja.

Fråga om medlemskap i Esperantoförbundet genom eaf@esperanto.fi.

Demandu pri membreco en EAF skribante al la repŝta adreso eaf@esperanto.fi.

Liiton hallitus ja jäsenjärjestöt: sivu 15

Estraro de EAF kaj membrosocietoj:

paĝo 15

Esperantoförbundets styrelse och medlemsföreningar: sidan 15

Ilmestyy neljä kertaa vuodessa paperi&

PDF-muodossa, lisäksi vuosittain PDF-lisäjulkaisu.

Utkommer fyra gånger i året i pappers- och PDF-format plus ett tillägg endast i PDF-format.

Eldonota kvarfoje jare en papera kaj en PDF-a formoj plus suplemento nur en PDF-a formo.

Esperantolehti 2/2026 ilmestyy huhtikuussa, utkommer i april, aperas en aprilo.

Tilaushinta v. 2026 ilman jäsenyyttä:

28 €/vuosi, tilaukset ja ilmoitushinnat:

☒ eaf@esperanto.fi

Prenumering utan medlemskap och annonspriser.

Abonprezo por ne-membroj kaj anoncoprezoj.

Afrikan nousu ja digitaalisen itsemääräämisoikeuden aamunkoitto

Afriikka on maanosa, joka hätkähdyttää rikkaudellaan. Sen maaperä kätkee sisäänsä valtavat varannot arvokkaita metalleja ja energiaa, ja sen nuori väestö on täynnä mahdollisuuksia. Silti taloudellisissa mittareissa se näyttäytyy usein köyhänä. Tämä ristiriita tulee esiin kaupan luvuissa. Esimerkiksi Kiinan tasavallan kaupan, kotimaan ja ulkomaan kauppa yhteensä, arvo vuonna 2024 oli liki 870 miljardia Yhdysvaltain dollaria, vaikka sen väestö on vain 23 miljoonaa. Samaan aikaan väestömäärältään kymmenkertaisen Nigerian kaupan kokonaisarvo jäi kymmenenteen osaan tästä. Tämä ero ei johdu luonnonvaroista tai työvoimasta, vaan rakenteista, järjestelmistä ja vallasta talouden taustalla.

Viime aikoina Afrikasta on kuitenkin kuulunut myös rohkaisevia talousuutisia. Yksi merkittävimmistä on *Pan-African Payment and Settlement System* eli PAPSS [en]. Tämä koko maanosan laajuinen maksujärjestelmä mahdollistaa sen, että afrikkalaiset yritykset ja pankit voivat käydä keskinäistä kauppaa omissa valuutoissaan ilman, että maksut kiertävät Yhdysvaltain dollarin tai eurooppalaisten pankkien kautta. Maksut nopeutuvat, kustannukset pienenevät ja valuuttariski vähenee.

PAPSS ei ole vain tekninen uudistus, vaan askel kohti digitaalista itsemääräämisoikeutta. Kun maksuliikenne pysyy Afrikassa, myös päätösvalta ja taloudellinen hyöty pysyvät siellä. Järjestelmä tukee Afrikan vapaakauppa-alueita [en] ja luo edellytyksiä aidosti maanosan sisäiselle kaupalle, teollistumiselle ja vaurauden kasvulle. Samalla se vähentää riippuvuutta ulkopuolisista rahoitus- ja maksujärjestelmistä, jotka ovat usein peräisin entisistä siirtomaavaltioista tai globaalin pohjoisen suuryrityksistä.



Samankaltainen kehityskulku on käynnissä lähempänä meitä. Euroopan unionin keskuspankin kehittämä digitaalinen euro [fi] tavoittelee vastaavaa riippumattomuutta. Tällä hetkellä maksuliikenne EU:ssa on pitkälti yhdysvaltalaisen suuryritysten, kuten Visan ja Mastercardin, hallinnassa – kyllä, joka kerta, kun maksat suomalaisella pankkikortilla suomalaisessa kaupassa yhdysvaltalainen yritys vetää välistä. Digitaalinen euro ei ole vain tekninen uudistus, vaan myös poliittinen ja taloudellinen valinta. Se vapauttaa EU:n ulkopuolisesta vallasta ja vahvistaa itsemääräämisoikeuttamme.

Esperanto-liike on aina puolustanut tasa-arvoa ja oikeudenmukaista viestintää kansojen välillä. PAPSS ja digitaalinen euro ovat konkreettisia askeleita kohti oikeudenmukaisempaa taloudellista maailmaa, jossa pienet toimijat voivat käydä kauppaa tasavertaisina suurten kanssa. Kun rajat ylittävä maksuliikenne helpottuu ja halpenee, myös esperantistien välinen yhteistyö, kaupankäynti ja hankkeiden rahoittaminen tulevat aiempaa mahdollisemmiksi. Esperanton perusajatushan on, että kieli ei saa olla valta-aseman väline. Samalla tavalla raha ei saisi olla. Oikeudenmukaisemmat maksujärjestelmät luovat mahdollisuuksia aidosti tasa-arvoiselle vuoropuhelulle – tämä on esperanton ydintä.

Juha Metsäkallas



La leviĝo de Afriko kaj la tagiĝo de cifereca suvereneco

Adaptite el la finnalingva originalo

Afriko estas kontinento, kiu mirigas per sia riĉeco. Ĝia grundo kaŝas vastajn rezervojn de altvaloraj metaloj kaj energio kaj ĝia juna loĝantaro estas plena je potencialo. Tamen laŭ ekonomiaj mezuroj ĝi ofte montriĝas malriĉa. Ĉi tiu kontraŭdiro evidentiĝas en la komercaj ciferoj. Ekzemple la totala valoro de la enlanda kaj eksterlanda komerco de la Respubliko Ĉinio en la jaro 2024 estis preskaŭ 870 miliardoj da usonaj dolaroj, kvankam ĝia loĝantaro nombras nur 23 milionojn. Samtempe la sama komerca valoro de Niĝerio, kies loĝantaro estas dekoble pli granda, restis nur je unu dekono de tio. Pri ĉi tiu diferenco ne kulpas manko de naturaj riĉaĵoj aŭ laborforto, sed de strukturoj, sistemoj kaj potenco malantaŭ la ekonomio.

Lastatempe el Afriko tamen venis ankaŭ kuraĝigaj ekonomiaj novaĵoj. Unu el la plej signifaj estas la Pan-African Payment and Settlement System, mallonge PAPSS [en]. Temas pri tutkontinenta pagsistemo, kiu ebligas al afrikaj entreprenoj kaj bankoj komerci inter si en propraj valutoj, sen ke pagoj devas pasi tra la usona dolaro aŭ eŭropaj bankoj. Pagoj rapidiĝas, kostoj malaltiĝas kaj valutriskoj reduktiĝas.

PAPSS ne estas nur teknika novigo, sed paŝo al cifereca suvereneco. Kiam la monfluj restas en Afriko, ankaŭ la decida povo kaj la ekonomia profito restas tie. La sistemo subtenas la Tutafrican Interkonsenton pri Liberkomerca Areo [en] kaj kreas kondiĉojn por vera tutafrica komerco, industriigo kaj kresko de prospero. Samtempe ĝi malpliigas la dependecon de eksteraj financaj kaj pagaj



sistemoj, kiuj ofte devenas de eksaj koloniaj potencoj aŭ de grandaj entreprenoj de la tutmonda nordo.

Simila evoluo okazas pli proksime al ni. La cifereca eŭro [fi], evoluigata de la Centra banko de EU, celas similan sendependecon. Nuntempe la pagtrafiko en EU estas grandparte regata de usonaj grandentreprenoj kiel *Visa* kaj *MasterCard* – jes, ĉiufoje kiam vi pagas per finna bankkarto en finna vendejo, usona entrepreno prenas komision. La cifereca eŭro ne estas nur teknika novigo, sed ankaŭ politika kaj ekonomia elekto. Ĝi liberigas la Eŭropan Union de ekstera regpovo kaj fortigas nian rajton pri memdecidado.

Ekde la komenco la Esperanto-movado ĉiam defendas egalecon kaj justan komunikadon inter popoloj. PAPSS kaj la cifereca eŭro estas konkretaj paŝoj al pli justa ekonomia mondo, en kiu malgrandaj agantoj povas komerci sur egala bazo kun grandaj. Kiam translimaj pagoj fariĝas pli facilaj kaj multtekostaj, ankaŭ la kunlaboro, komerco kaj financado de projektoj inter esperantistoj fariĝas pli realigeblaj ol antaŭe. La baza ideo de Esperanto ja estas, ke lingvo ne estu instrumento de potenca hegemonio. Sammaniere ankaŭ mono ne estu tia. Pli justaj pagsistemoj kreas eblojn por vere egala dialogo – tio estas la kerno de Esperanto.

Juha Metsäkallas

EAF informas – Liitto tiedottaa

Espereble la nova jaro bonorde komenciĝis por ĉiuj niaj membroj, kvankam ja okazas multaj malbonaj aferoj en la nuna maltrankvila mondo. Niaj sekvaj eventoj tamen estas la kutimaj: Vintraj Tagoj kaj Somera kurso. Notu ankaŭ la renkontiĝojn de membrosocietoj kaj aliaj aktivaj grupoj.

Vintraj Tagoj okazos post kelkaj jaroj denove en la urbo Salo. Legu pri la programo sur la paĝoj 9–11 kaj plenigu la aliĝilon en la retejo. Se vi havas demandojn, estu en kontakto.

Por la Somera kurso ni havos novan kontakton. La instituto *Raisio-opisto* akceptis nian kurson kaj helpas kun la praktikaj aranĝoj kiel kun kolekto de la kursokotizo. Espereble venos multaj kursanoj en ĉiuj niveloj: elementanoj, progresantoj kaj diskutantoj, ankaŭ vizitantoj estas bonvenaj. Legu pli sur paĝo 12.

La kongresa karavano al UK en *Graz* tamen ne realiĝos, ĉar jam pasis la unua aliĝperiodo. Do, planu vojaĝojn memstare per flugoj, trajnoj aŭ per propra aŭto. Informu unu la alian, se vi intencas partopreni, tiel vi eble trovos kunvojaĝantojn.

Por Aŭtunaj Tagoj ni ne ankoraŭ povis elekti taŭgan regionon aŭ urbon. Ni ricevis kelkajn proponojn, sed ne konkretan planon kiel realigi la tagon aŭ semajnfinojn por tiu evento. Ĉiuj sugestoj estas bonvenaj.

La membrokotizojn por la jaro 2026 decidis la jarkunveno en Salo, la 7-an de marto. La estraro de EAF ne sugestis ŝanĝon al la nunaj kotizoj, nek al individuaj membroj nek al aligitaj tra la membrosocietoj. Notu, ke ĉi-jare vi ricevos peton pagi la membrokotizon tra EAF, ankaŭ se vi estas membro de iu membrosocieto. Ĉiu membrosocieto tamen havas sian propran kotizon. La pagopeto alvenos post la jarkunveno en Salo. Informoj al membroj estas senditaj ĉefe tra retpoŝtaj mesaĝoj.

Ni bonvenigas vin al la jarkunveno por decidi pri asociaj aferoj. Demandoj kaj sugestoj koncerne nian agadon ni tre volonte ricevos. Kontaktoinformojn vi trovas sur la paĝo 15.

Hyvää alkanutta vuotta kaikille, toivotavasti se itse kullakin alkanut rauhallisissa merkeissä tässä nykyisessä hieman levottomassa maailmassa. Esperantoliiton toiminta ainakin jatkuu tutuissa kuviissa: Talvipäivät ja kesäkurssi ovat seuraavat tapahtumamme. Huomaa myös jäsenyhdistysten ja muiden aktiivisten ryhmien tapaamiset ja kokoontumiset.

Talvipäivät ovat taas monen vuoden jälkeen Salossa. Katso tarkemmat tiedot ohjelmasta sivuilta 9–11 sekä ilmoittaudu verkkosivujen lomakkeella tai muuten. Ole yhteydessä, jos kysyttävää.

Kesäkurssi on tänä vuonna uudessa paikassa: Raisio-opistossa, joka auttaa meitä myös käytännön järjestelyissä. Kurssitiedot ovat jo opiston sivulla. Odotamme runsaasti osallistujia, myös vierailu on mahdollista. Katso lisää sivulta 12 ja kysy lisää.

Yhteinen linja-automatka maailmankongressiin Itävaltaan kesällä ei tällä kertaa toteudu. Toivottavasti monet kuitenkin matkustavat sinne omatoimisesti ja saamme mukavia raportteja syksyn lisäjulkaisuumme.

Syyspäivien paikkakuntaa ei vielä ole valittu. Olemme saaneet muutaman ehdotuksen, mutta olisi mukava saada konkreettinen suunnitelma päivän tai viikonlopun ohjelmaksi.

Vuoden 2026 jäsenmaksun määrittää Salossa maaliskuun 7. päivä pidettävä liiton vuosikokous. Liiton hallitus ei ehdota korotuksia jäsenmaksuihin. Tänä vuonna jäsenmaksupyynnö tulee liiton kautta niin liiton henkilöjäsenille kuin myös jäsenyhdistysten



jäsenille. Kukin jäsenyhdistys kuitenkin päättää omasta jäsenmaksustaan. Liitto hoitaa maksujen käytännön perimisen ja maksaa yhdistyksille heidän osuutensa. Jäsenmaksupyyntö tulee vasta liiton vuosikokouksen jälkeen. Lähetämme tiedotteet pääasiallisesti sähköpostilla.

Tervetuloa kaikki myös Esperantoliiton vuosikokoukseen Saloon päättämään yh-

teisistä asioista. Kysymyksiä ja ehdotuksia liiton toimintaan liittyen otamme mielellämme vastaan. Yhteystiedot ovat sivulla 15.

*Ĝis la en diversaj eventoj kaj renkontoj!
Tapaamisiin eri tilaisuuksissa!*

*La estraro de Esperanto-Asocio de Finnlando
Suomen Esperantoliiton hallitus*

Pri justo kaj modero

Ĝuste nun, en januaro 2026, estas okazanta en Irano sanga reprezalio kontraŭ civitanoj postulantaj demokratian kaj egalecan sociordon kaj abolon de la teokratia reĝimo. Tio rememorigas al mi okazaĵojn ĉirkaŭ la kvara UK nialande, pri kiuj mi ne plu povas silenti.

En la listo de kongresanoj de nia 104-a en Lahti en 2019 aperas 11 nomoj el Irano. Naŭ ne povis alveni. Ili estis tri paroj geedzaj kaj iliaj tri infanoj. Ili petis vizojn jam en februaro. La Finnlanda ambasado en Teherano postulis foje kaj refoje aldonajn dokumentojn, estis liveritaj, ne respondis rete nek telefone, fine la 21-an de majo ili rifuzis la vizojn.

Revizipostulo al la eksterlanda ministerio

de Finnlando estis tie akceptita la 7-an de junio. La rifuzaj decidoj venis la 16-an de julio. Apelacii estis absolute malfrua.

Povas esti, ke la irananoj planis kongresani por resti eksterlande. Tiam, kiel nun, multaj irananoj havis tiel ekonomiajn kiel politikajn motivojn tiel fari. Tutegale kial la rifuzoj estas motivitaj, la procezo estas ne honoriga al la Finnlanda ŝtato.

Pri kelkaj aliĝintoj en Ĉinio kaj Nepalo la koncernaj konsulejoj demandis min rekte pri plia klarigo pri la kongreso, kiel korektas kaj decas.

*Tuomo Grundström
LKK-prezidanto de la 104-a*

Esperanto-klubo de Helsinki informas

La kafejaj renkontiĝoj de Esperanto-klubo de Helsinki (EKH) en 2026 okazos ĉiun duan sabaton:

En februaro: 14.2. kaj 28.2.

En marto: 14.3. kaj 28.3.

En aprilo: 11.4. kaj 25.4.

En majo: 9.5. kaj 23.5.

La renkontejo kaj tempo: kafejo *Robert's Coffee*, adreso *Kampinkuja 2* (Sähkötalo) je la 14-a horo.

Vi estas ĉiuj bonvenaj partopreni en la renkontiĝoj. Pro eblaj ŝanĝoj kaj por scii la diskuttemon de la renkontiĝo, sekvu informojn en nia retejo:

esperantohelsinki.wordpress.com

Tervetuloa tapaamisiin myös ne, jotka olette vasta tutustuneet esperantoon. Lisätietoja tapaamisista ja muusta toiminnasta saa Helsingin Esperantoseuran verkkosivulta esperantohelsinki.wordpress.com Yhteyssähköposti esperanto@bastu.net

Esperantogrupo en Oulu informas

Nia oŭluana grupeto kunvenas la lastan sabaton de ĉiu monato je la 13-a horo en la biblioteko de *Karjasilta, Leevi Madetojan katu 1*. Pro la ŝlosita pordo, bonvolu informi nin: sendu tekstmesaĝon al 040 8329075. Bonvenon!

Oulu-ryhmä kokoontuu joka kuun viimeinen lauantai klo 13 Karjasillan kirjastossa. Ilmoita tulostasi tekstarilla minulle. Tervetuloa!

Leila Tiitto

Esperanto-societo en Turku informas


Niaj kursoj en la *Civitana Instituto de Aurala* rekomenciĝis en januaro kaj same la semajnaj renkontoj. Kursotago estas mardo kaj eblas vizito tie. Ni planas ankaŭ partoprenon en la lingva kafejo de Aurala-instituto iun mardon. La semajnaj renkontoj plej ofte estas ĵaŭde kaj okazos en la ĉefbiblioteka kafejo *Sirius*, sed ankaŭ aliaj tagoj kaj lokoj eblas.

En decembro studis en la Universitato de Turku *Pierre* el Francio. *Pierre* scipovas ankaŭ Esperanton, do li multfoje vizitis niajn kafejajn renkontojn. Ni donacis al li kiel memoron el Finnlando la libron *Kie boacoj vagadas*. Juha fotis *Pierre* kun la libro en la kafejo *Sirius*.

Vi estas bonvenaj partopreni ĉiujn niajn aranĝojn, sed bonvole informu pri via alveno, vidu la kontaktosciojn.

La horojn kaj tagojn vi trovas ĉe EST-eventotokalendaro de la *Finna Babilejo* (finnababilejo.fi)

Bonvenon!



Pierre. Foto: JM.

Näet tiedot Finna Babilejon tapahtumakalenterista nimeltä EST-eventotokalendaro. Ole hyvä ja ilmoita tulostasi sähköpostilla tai puhelimitse. Tervetuloa!

Por EST-anoj,
Tiina Oittinen
(kontaktoscioj p. 15, yhteystiedot s. 15)

Turun Esperanto-yhdistyksen kurssit jatkuvat tiistaisin klo 16–19 Auralan kansalaisopistossa, kurssilla voi myös vierailla. Auralassa on keväällä kielikahvila tiistaisin, kurssiryhmämme on tarkoitus osallistua siihen muutama kerran. Viikkotapaamiset jatkuvat useimmiten torstaisin. Aina silloin tällöin saamme myös vieraita viikkotapaamiseen kuten nyt joulukuussa.

Esperanto-societo Antaŭen informas

Bonvenon al Tampere kaj al niaj renkontiĝoj!
Niaj renkontiĝoj okazos ĵaŭde je 13–15 en
Kulttuuritalo Laikku,

en la ĉambro *Mäkelän kabinetti*, 3-a etaĝo:
en februaro: 12.2. estrara kunveno kaj 26.2.
printempa jarkunveno

en aprilo: 9.4. lingvaj taskoj
en majo-junio ni planas ekskurson, pliaj infor-
moj venos

Por viziti kaj por informiĝi pri aliaj renkontiĝoj,
bonvolu kontaktiĝi kun *Raimo* aŭ kun *Sylvia*.

*Tapaamisemme tammi-huhtikuussa ovat Kult-
tuuritalo Laikussa, Mäkelän kabinetissa 3.
kerros*

*torstaisin klo 13–15 seuraavasti:
helmikuussa yhdistyksen hallituksen kokous
12.2. ja kevätkuusiokokous 26.2.
huhtikuussa 9.4. kielellisiä tehtäviä
touko-kesäkuussa on suunnitteilla retki, lisä-
tietoja tulossa*

*Ole hyvä ja ilmoita tulostasi etukäteen
Raimolle tai Sylvialle.
raimo.tuisku@saunalahti.fi tai
sylvia.h@kolumbus.fi, tel: 050 321 4313.*

*Tervetuloa tapaamisiimme!
Estraro de Antaŭen ja kaikki antaŭenilaiset*

La kultura ĉefurbo de Eŭropo 2026 Oulu

Ĉi jare la kultura ĉefurbo de Eŭropo estas mia
kara hejmurbo *Oulu*.

En la antaŭaj jarcentoj Oulu estis konata pri
ŝipoj kaj gudro, nuntempe pri teknologio kaj
vintra biciklado. Ni nek timas neĝon aŭ mal-
varmecon nek helajn somernoktojn.

Ĉi tiu jaro estas plena de kulturaj aferoj, pli
ol 1000 diversaj okazaĵoj, ne nur en la urbo,
sed ankaŭ en 40 proksimaj komunumoj. Oulu
ofertas ekspoziciojn, teatraĵojn, muzikon,
artaĵojn, kreaĵojn kaj spertojn. Ne nur en la
finna, sed ekz. opero *Ovllä* en la nordsamea
lingvo.

La jubilea jaro ne estas nur por oulanoj
mem, ni elkore bonvenigas ĉiajn vizitantojn.



Kiel la nuna prezidento de Finnlando diris:
”Oulu estas eĉ pli mojosa ol vi pensas.”

Por pli da informoj,
bonvolu rigardi oulu2026.eu

Leila Tiitto

Vintraĵ Tagoj de EAF 7.–8.3.2026 en Salo

Suomen Esperantoliiton talvipäivät (VT) 7.-8.3.2025 Salossa

Vintraĵ Tagoj kaj jarkunveno de Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF) okazos en Salo dum la semajnfino de 7-a ĝis 8-a de marto. Nia kunvenejo estas en *Original Sokos Hotel Rikala* (same kiel pasintan fojon en 1989) en la urbocentro kiel jam informita en la alvoko. Al la hotela paketo apartenas la tagmanĝo kaj posttagmeza kafo je sabato, krome eblas antaŭmendi la lunĉon en dimanĉo. En sabato *Jouko Lindstedt* kaj *Jukka Pietiläinen* rakontos al ni pri la vivo de *Vilho Setälä* kaj pri *Fondumo Esperanto-säätiö*. Post la tagmanĝo estos la jarkunveno, kie ni pritraktos la aferojn laŭ la nova statuto. Jarkunvenaj dokumentoj estos sendataj retpoŝte al membroj fine de februaro, ligilo al ili venos el la adreso eaf@esperanto.fi.

En dimanĉo ni vizitos la Elektronikan muzeon de Salo, kie ni dum la finlingva ĉiĉeronita rondirado lernos pri teknologio lige al modernaj komunikiloj kaj ilia historio. Ni vidos radio-aparatojn, televidilojn kaj telefonojn, kiuj nun jam aspektas antikvaj, kvankam multaj el ni certe memoras kaj eĉ uzis ilin. Ni provu kunlabore ekpensi iliajn esperantlingvaj nomojn. La muzea vizito apartenas al la aliĝkotizo, sed se vi havas muzeokarton, bonvolu kunpreni ĝin.

Nin bonvenigas lokaj esperantistoj, ekzemple *Mary Tähtinen*. Post la muzea vizito ni havu komunan lunĉon kaj fermos la Tagojn antaŭ la hejmvoyoĝo.

Esperantoliiton talvipäivät ja vuosikokous ovat tänä vuonna Salossa 7.–8.3.2026. Kokouspaikkana on Original Sokos Hotel Rikala,

jonka ravintolassa lauantaina nautitaan myös lounas ja iltapäiväkahvit. Päivien luennot käsittelevät Vilho Setälää ja hänen aloitteestaan syntynyttä Fondumo Esperanto-säätiötä; niistä meille kertovat Jouko Lindstedt ja Jukka Pietiläinen. Kerromme myös tulevista tapahtumista Suomessa ja muualla. Lisäksi esperantonkielisiä kirjoja ja muita tavaroita on jonkin verran esillä ja ostettavissa.

Vuosikokouksen asiakirjat lähetetään jäsenille sähköpostilla helmikuun loppuun mennessä. Huomaa, että tänä vuonna noudatamme ensimmäisen kerran uusia sääntöjä, jotka käsiteltiin ja hyväksyttiin viime vuonna.

Iltapäiväkahvien jälkeen voimme vapaasti viettää lauantai-iltaa joko hotellin ravintolassa tai muualla kaupungilla.

Sunnuntain ohjelmassa on käynti Salon elektroniikkamuseossa. Kierroksella museon opas avaa meille viestinnän, viestintälaitteiden ja elektroniikkateollisuuden kehitystä ja historiaa 1920-luvun lopulta alkaen tähän päivään. Tutustumme etenkin Salossa valmistettuihin laitteisiin. Varmaan monelle meistäkin ovat tuttuja vanhat radiot sekä mustavalkoiset televisiot ja muistamme miten soitettiin lankapuhelimella ennen kuin saimme käyttöön ensimmäiset kännykät.

Museokäynnin jälkeen maistuu varmaan lounas (muista tilata se etukäteen) ennen kotimatkan alkua. Salossa asuu muutama esperanton harrastaja, jotka toivottavat meidät tervetulleiksi päiville.

*Bonvenon, tervetuloa!
La estraro de EAF*



ALIĜILO

Vintraj Tagoj de EAF 7.–8.3.2026 en Salo

Bonvolu aliĝi uzante la formularon en nia retejo www.esperanto.fi (ligilo sendita al membroj de retpoŝtadreso eaf@esperanto.fi). Vi povas aliĝi ankaŭ retpoŝte aŭ telefone al la sekretario *Tiina Oittinen*, vidu p. 2. Ŝi respondas al viaj eventuale alaj demandoj.

Indiku vian nomon, retpoŝtan adreson kaj/aŭ telefonnumeron. Sciigu al ni, se vi havas specialan dieton aŭ aliajn dezirojn. Diru ankaŭ se vin interesas komuna vespermanĝo en sabato kaj lunĉo en dimanĉo, ambaŭ proprakoste, la sekretario faros la rezervon (vidu la programon).

Partoprenkotizo (enhavas lunĉon kaj kafon sabato kaj muzean viziton dimanĉe):

55 € ĝis 16.2.2026

59 € post 16.2.2026

65 € por ne-membroj (tutan aliĝperiodon)
18 € lunĉo en dimanĉo en hotelo Rikala
(antaŭmendo kaj -pago)

Pagu al la konto de EAF:

FI82 5721 1520 2859 38.

Bv. uzi la **VT-referencnumeron 4640** (ne skribu aliajn informojn en la pagilon)

VT-tranoktado REZERVU MEM: Oferto de la hotelo Original Sokos Hotel Rikala per kodo BESPERANTO (la litero B estas parto de la kodo) plej laste 13.2.2026.

Vidu en la finnlingva aliĝilo kontaktosciojn de la hotelo kaj la oferto-prezoin.

BONVENON!

ILMOITTAUTUMINEN

Suomen Esperantoliiton talvipäivät (VT) 7.-8.3.2025 Salossa

Ilmoittaudu verkkosivujen lomakkeella, johon saat linkin jäsentiedotteessa sähköpostiosoitteesta eaf@esperanto.fi tai vaihtoehtoisesti sähköpostilla tai puhelimitse siht. Tiina Oittiselle, ks s. 2. Tiinalta saat myös tarvittaessa lisätietoja.

Ilmoita nimesi, sähköpostiosoitteesi ja/tai puhelinnumerosi sekä mahdolliset erikoisruokavaliot. Kerro myös, jos olet halukas osallistumaan illalliselle lauantain ja lounaalle sunnuntaina (omakustanteiset), sihteerin tekee varaukset sen mukaan (katso tarkemmin ohjelman kuvauksesta).

Osallistumismaksu: (sis. ohjelman, kahvit sekä kaupunkikävelyt la-su.):

55 € 16.2.2026 asti

59 € 16.2.2026 jälkeen

65 € ei-jäsenille (koko ilmoittautumisajan)

18 € lounas hotelli Rikalassa sunnuntaina (etukäteistilaus ja -maksu)

Maksa Suomen Esperantoliiton tilille:

FI82 5721 1520 2859 38.

Käytä viitenumeroa **4640** (ei muita tietoja viite- tai viestikenttään maksun yhteydessä).

VT-yöpyminen: VARAA ITSE Hotellin majoituskiintiö Original Sokos Hotel RIKALA, tunnus-koodi BESPERANTO (B-kirjain kuuluu koodiin) 13.2.2026 asti.

Tarjoushinnat 109 € 1 hh/yö, 134 € 2 hh/yö. Kysy myös S-etukortin hintaa tai mahdollista eläkeläisälennusta, voivat olla hotellin tarjousta edullisempia.

verkko-osoite, retejo: www.sokoshotels.fi

puh., tel: +358 (0)2 7744 100

sähköposti, retpoŝto: reception.rikala@sok.fi

Hotellin yhteydessä parkkipaikkoja, tiedustele kun teet varauksen.

TERVETULOA!

Vintraj Tagoj – Talvipäivät

7.–8.3.2026

Hotelo Original Sokos Hotel Rikala,
Asemakatu 15, Salo



Programo – Ohjelma

(ŝanĝoj eblas – muutokset mahdollisia)

Vendredo / Perjantai 6.3.2026 Vespera renkontiĝo por tiuj, kiuj alvenos en Salo jam en vendredo. Iltatapaaminen niille, jotka tulevat Saloon jo perjantaina.

Sabato / Lauantai, 7.3.2026

8.00–10.00..... Matenmanĝo en la hotelo por tranoktantoj. *Aamiainen hotellissa yöpyville.*

12.15–12.30 ... Akceptejo malferma. *Ilmoittautuminen päiville.*

12.30–14.00 ... Malfermo de la Tagoj en la kunvenejo. *Päivien avaus kokoustilassa.* Jouko Lindstedt prelegas pri la vivo de Vilho Setälä. *Jouko Lindstedtin luento Vilho Setälästä ja Fondumo Esperanto-säätiön synnystä.*

Jukka Pietiläinen rakontas kiel funkcias Fondumo Esperanto-säätiö. *Jukka Pietiläinen kertoo Fondumo Esperanto-säätiön nykypäivän toiminnasta.*

14.00–14.45.... Lunĉo en la hotela restoracio. *Lounas hotellin ravintolassa.*
(*kuuluu osallistumismaksuun*)

15.00–17.00.... Jarkunveno de EAF, por membroj. Alvoko aperis en Esperantolehti 4/2025. *Suomen Esperantoliiton vuosikokous, jäsenille. Vuosikokouskutsu Esperantolehdestä 4/2025.*

17.15–18.45.... Libera kunestado kun kafo, teo kaj dolĉaĵetoj en la kunvenejo. Libroservo. *Vapaata yhdessäoloa kokoustiloissa. Tarjolla kahvia, teetä, makeaa kahvilleipää (kuuluu osallistumismaksuun). Esperantotavaroiden myyntiä.*

18.45–19.30.... Paŭzo *Tauko.*

19.30–..... Libera vesperumo en la hotela restoracio aŭ en alia loko en la urbo laŭ propra elekto. *Vapaata yhdessäoloa esim. hotellin ravintolassa tai muualla kaupungilla.*

Dimanĉo / Sunnuntai, 7.3.2026

8.00–10.00..... Matenmanĝo en la hotelo por tranoktantoj. *Aamiainen hotellissa yöpyville.*

10.30–11.00.... Kolektiĝo en la enireja halo de la hotelo, ekiro kune. Promenado al la Elektronika muzeo de Salo, kie ĉiĉeronita rondirado en la finna. *Kokoontuminen hotellin aulassa. Yhteinen kävely Salon elektroniikkamuseoon, jossa opastettu kierros klo 11 alkaen. Osoite/adreso: Salorankatu 5–7 (Astrum-keskus), ovi/pordo 3*

12.30–13.30.... Lunĉo en la hotela restoracio (laŭ antaŭmendoj, vidu aliĝilon). Fermo de la Tagoj. *Lounas hotelli Rikalan ravintolassa (ennakkotilausten mukaan, ks. lomake). Talvipäivien päätössanat.*

Bonan hejmvojaĝon kaj ĝis la revido!

Kesäkurssi – Somera kurso 4.-7.6.2026 Raisio

Suomen Esperantoliiton (EAF) kesäkurssi on tänä vuonna 4.-7.6.2026 Raisiossa. Se järjestetään yhteistyössä Raisio-opiston kanssa, kurssipaikkana Raision lukio. Raisio on sekä Turun että Naantalın naapurikaupunki ja paikallisliikenne Föli kuljettaa sinne sujuvasti.

Pääopettajana toimii jälleen romanialainen Rodica Todor, jonka opetuskieli on esperanto. Suomenkielisiä opettajina ovat Tiina Oittinen ja Juha Metsäkallas. Kuten aikaisemmillä kesäkursseilla järjestämme sekä alkeis- että jatkokurssin. Kaikki kurssilaiset ovat osa sekä pienryhmää että koko kurssiryhmää. Kurssilla pääsevät myös vasta-alkajat heti käytännössä kokeilemaan uutta kieltä.

Oppitunteja opistotalolla on päivittäin noin viisi. Yhteisillä kahvi- ja ruokailutauoilla eri ryhmien kurssilaiset tutustuvat sekä toisiinsa että opettajiin. Kurssiin lisänä on myös monipuolista vapaa-ajan ohjelmaa.

Kurssille ilmoittaudutaan tällä kertaa suoraan Raisio-opistoon ja myös kurssimaksu 48 euroa maksetaan Raisio-opistolle. Kun olet ilmoittautunut, saat kurssin päivittäisen ohjelman ja tarkemmat maksutiedot. Raisio-opiston sivuille pääsee myös www.esperanto.fi

etusivulta kohdan Ajankohtaista kautta.

Lisätietoja antaa kurssivastaava ja kurssin alkeisryhmän opettaja Tiina Oittinen, Suomen Esperantoliiton sihteeri. Lähetä kysymyksesi hänelle sähköpostiosoitteeseen eaf@esperanto.fi otsikolla Raision Esperantokurssi.

Huomaa myös stipendimahdollisuus Fondumo Esperanto-säätiöltä, tiedot Esperantolehdestä 5/2025 tai säätiön verkkosivuilta fondumo.esperanto.fi. Säätiön toiminnasta kerrotaan myös liiton talvipäivillä Salossa.

Somera kurso de Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF) okazos ĉi-jare 4.-7.6.2026 en la urbo Raisio, najbara urbo de la urbo Turku en sud-okcidenta Finnlando. Instruas: Rodica Todor (el Rumanio), Tiina Oittinen kaj Juha Metsäkallas (el Turku). Pliaj informoj en nia retejo www.esperanto.fi kaj de Tiina Oittinen, eaf@esperanto.fi

Tervetuloa kesäkurssille Raisioon!
Bonvenon al Raisio!

Suomen Esperantoliiton opetusryhmä
La instrua teamo de EAF



Rodica Todor. Foto JM.



De maldekstre Tiina, Sylvia kaj Rodica dum la Somera kurso en Hämeenlinna lastjare. Foto JM.

Peto de svisa studento Oscar Pasche

En septembro lastjare nin kontaktis Oscar Pasche, svisa liceano, kiu faris sian licean maturigan laboraĵon pri Esperanto. Por la laboro Oscar faris enketon pri lernado de Esperanto en diversaj landoj kaj ri petis, ke ni plusendos la enketon ankaŭ al finnlandaj esperantistoj. Ni akceptis kaj sendis la enketon al plejparto de niaj membroj. Dankon, se vi respondis kaj tiel helpis la junan studenton.

Ni petis, ke Oscar raportu al Esperantolehti pri la enhavo de sia laboraĵo. Nun en januaro ni ricevis de ri jenan raporton. En korespondado kun Oscar estis la sekretario Tiina Oittinen.

Plejbone mi unue prezentigis. Mi nomiĝas Oscar Pasche, loĝas en Svisio kaj estas 19-jaraĝa liceano.

Kadre de la liceaj studoj en Svisio, ĉiu liceano devas verki Maturigan Laboraĵon, kiu antaŭkonfirmas sian diplomon. La temon ri rajtas elekti, sed ĝi devas esti prizorgita el unu el la profesoroj de la sama liceo ol la studento.

Mi elektis la ĉi temon: "Je kia mezuro la adopto kaj kreado de esperanto reprezentas idealojn de universaleco kaj egaleco?" Mi unue mallonge prezentas esperanton, sian historion kaj la intencon de ĝia aŭtoro, L.-L. Zamenhof.

Poste, mi prizorgas pri ĝia universaleco. Ĝi estas la parto scienca, en kiu mi traktas pri la karakteristiko lingvistikaj, kiuj troviĝas en la plejmulto (eble eĉ la tuto) de la lingvoj en la mondo. Tio estus, malvere sed ekzemple, regulo pri pluralo: oni aldonas literon ĉe la fino de iu vorto por indiki la pluralon (en esperanto, tio estus -j). En tiu parto, mi ankaŭ traktas la asimiladon ĝeneraligan, t.e. psikologia eco kiu postulas, ke iu ajn lernanto ĝeneraligas iun okazon (povas esti en lingvoj, sed ankaŭ tre ĝenerale) al pli da okazoj per plej regula kiel eble regulo.

Sekve de la parto pri universaleco, mi prizorgas pri egaleco. Tiu estas la plej malfacila, ĉar ĝi enhavas informojn pli malpli vidpunktajn, kiu ne nepre estas sciencaj. Ĝi estas parto politika, kaj defendas vidpunkton konsekvence de la universaleco analizita en la dua parto de esperanto. Se lingvo ajn estas universala, ĉu ĝi estas taŭga por individuaj homoj? Ĉu ĝi estas taŭga helplingvo por la homaro? Ĉu necesas havi universalan lingvon? Tiu estas de-

mandoj, kiujn oni povas subteni per sciencaj argumentoj, sed nepre estas subtenataj per valoroj, kiuj ne estas universalaj (ekzemple, volo de egaleco, volo de interkompreniĝo homara, ktp). La celo de tiu parto estas almenaŭ priparoli la kongruon inter la fono scienca de esperanto, kaj ĝiaj celoj (ekzemplo de tiu malkongruo inter fono kaj celo: tiu de Volapuko).

Malgraŭ tiuj analizoj, mi konkludas ke studoj sciencaj sen konfirmaj antaŭjuĝoj ne sufiĉe ekzistas pri esperanto, por fari bonkvalitan laboron. Ili plejparte kvazaŭ tute estas faritaj el esperanto-ŝatantoj esperantistoj, en la plej malbona kazo el finvenkistoj (ilustro de ĉi tiu fakto estas ke plejmulto de la studoj pri esperanto estas rekte esperantlingvaj). Tio estas granda problemo, ke homoj kiuj interesiĝas pri esperanto ŝatas esperanton kun ĉiujn idealojn malantaŭajn (inkluzive de mi mem). Mi do konkludas ke studoj pli progresontemaj devus okazi, kaj la demandojn de mia Maturiga Laboro oni progresigus.

Tial mi kandidatiĝis por la nacia konkurso de la finjaraj projektoj liceaj. Mia laboraĵo trapasis la unuan etapon, kaj nun mi devas prezenti ĝin ĉe la duonfino de la konkurso. Ĝi do evoluas pli kaj pli. Eble se ĝi trapasus la duonfinon, mi prezentus ĝin ĉe nacia skalo, kaj se ĝi daŭrigus bone, ĉe internacia skalo. Tio vere estus interesa por la movado kaj la scienco interlingvistika. Mi intencas fari rigorecan laboraĵon, demandante al la plej kapablaj homoj pri ĝi, kaj fari grandskalan studon, kiu voloras science.

Elkore,

Oscar Pasche (Oskaro Paŝo) el Svisio

Lingva Angulo 2 de Jouko Lindstedt

Pri verbotempoj

Esperanto havas tri verbotempojn. La as-tempo indikas nunajn okazaĵojn kaj faktojn: *Mi malsatas. Helsinko estas la ĉefurbo de Finnlando.* La is-tempo indikas pasintajn okazaĵojn: *Hieraŭ mi vizitis mian patrinnon.* La os-tempo indikas estontajn okazaĵojn: *Morgaŭ mi telefonos al vi.* La finna lingvo havas tri pasintajn verbotempojn (ekzemple 'teki', 'on tehnyt', 'oli tehnyt'), Esperanto nur unu (*faris*). Sed la finna plej ofte uzas la saman verbotempon pri nunaj kaj estontaj okazaĵoj, kaj tial finnaj esperantistoj devas memori uzi pri la estonteco la Esperantan os-tempon kvankam en la finna oni uzas prezentcon: 'Juna lähtee kolmelta.' *La trajno ekveturos je la tria.* 'Huomenna on maanantai.' *Morgaŭ estos lundo.*

Se iu okazaĵo komenciĝis en la pasinteco kaj plu daŭras, la finna lingvo uzas unu el siaj pasintaj verbotempoj, la perfektan, kiam oni indikas la daŭron de la okazaĵo: 'Olen asunut Turussa kymmenen vuotta.' Esperanto uzas la simplan as-tempo: *Mi loĝas en Turku dek jarojn* (aŭ: *de dek jarojn*).

La samaj tri Esperantaj verbotempoj aperas en la participaj sufiksoj, la aktivaj *ant*, *int*, *ont* kaj la pasivaj *at*, *it*, *ot*, ekzemple *leganta knabo* ('lukeva poika'), *legata libro* ('luettava kirja'), *legita libro* ('luettu kirja'). Sed la participoj indikas la tempon ne rilate al la nuna tempo, sed rilate al la momento preparolata: *Mi vidis ridetantan knabinon* (la knabino eble ne nun ridetas, sed ridetis kiam mi vidis ŝin); *Mi trovis mortintan raton*; *Sur la planko kuŝis lavotaj vestaĵoj* (nun ili eble estas jam lavitaj, sed en la preparolata momento ili estis ankoraŭ lavotaj). La participoj estas uzataj ankaŭ kun la verbo *esti*, ekzemple *estis ridetanta*, *estis trovita*, kaj tiam ilia signifo estas

iom pli malsimpla demando, pri kiu mi skribos alian fojon.

Kiam ni rakontas pri ies diroj aŭ pensoj, plej ofte per frazo markita per *ke*, ni uzas verbotempojn rilate al la vidpunkto de la dirado aŭ pensado, ne rilate al la nuna tempo. Ekzemple: *Ŝi diris, ke Oulu estas bela urbo.* En la finna ni povus ĉi tie uzi ankaŭ pasintan verbotempon: 'Hän sanoi, että Oulu oli kaunis kaupunki' – sed en Esperanto *Ŝi diris, ke Oulu estis bela urbo* signifus, ke ŝi parolis pri iu pli frua situacio (kaj povus do tradukiĝi 'Hän sanoi, että Oulu oli ollut kaunis kaupunki').

Simile, kiam oni rakontas, kion iu diris aŭ pensis pri la estonteco, ni uzas os-tempo: *Ŝi diris, ke ŝi telefonos al mi la sekvan tagon.* Multaj okcidenteŭropaj lingvoj, inkluzive de la finna, uzas en ĉi tiaj *ke*-frazoj sian kondicionalon, do us-modon: 'Hän sanoi, että soittaisi minulle seuraavana päivänä', sed en Esperanto "ke ŝi telefonos al mi la sekvan tagon" estas eraro – ĝi estas uzebla nur se ni scias, ke ŝi efektive ne povos telefoni: *...ke ŝi telefonos al mi, se ŝi ne sidus la tutan tagon en aviadilo.*

Alispeca komplikita temporilato aperas, kiam ni rakontas, ke ni faros ion nur post iu alia estonta faro. En la finna ni povas diri ankaŭ pri la estonteco jene: 'Kun olen siivonnut huoneeni, voin vihdoon levätä.' Sed tion oni ne traduku per "Kiam mi ordigis mian ĉambron, mi povos fine ripozi", ĉar *ordigis* signifas, ke la ordigado okazis jam antaŭ la nuna momento. Ekzistas pluraj ebloj diri la aferon en bona Esperanto: *Unue mi ordigos mian ĉambron, poste mi povos fine ripozi.* *Post kiam mi ordigos mian ĉambron, mi povos fine ripozi.* *Kiam mi estos ordiginta mian ĉambron, mi povos fine ripozi.* *Ordiginte mian ĉambron mi povos fine ripozi.*

Suomen Esperantoliiton ja jäsenjärjestöjen yhteystiedot

Esperanto-Asocio de Finnlando,
Suomen Esperantoliitto ry
Esperantoförbundet i Finland
Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande:

Juha Metsäkallas, Turku

✉ eafprezidanto@esperanto.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/

Vice ordförande: *Paula Niinikorpi, Pori*

✉ paula.niinikorpi@gmail.com

Sekretario/Sihteerii/Sekreterare:

Tiina Oittinen, Turku

☎ 050 549 4709, ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör:

Tiina Kosunen, Espoo ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto (de EAF): FI82 5721

1520 2859 38 (notu: pagoj al UEA, vidu sube)

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet /

Övriga styrelsemedlemmar:

Tuomo Grundström, Rauma, ☎ 0440 199 766,

tuomo.grundstrom@gmail.com

Arja Kuhanen, Tammela,

✉ kuhanenarja@gmail.com

Päivi Saarinen, Helsinki, ☎ 050 490 0154,

✉ paivi.saarinen@iki.fi

Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:

Leila Tiitto, Oulu, ✉ leila.a.tiitto@gmail.com

Robert Bogenschneider, Pori,

✉ brilanto@gmail.com

Jukka Laaksonen, Tampere,

✉ jvaletto@kolumbus.fi

Maksut UEA:lle, yhteyshenkilö/ Peranto de

UEA ktp / Betalningar till UEA:

FI57 1815 2913 6360 14, NDEAFIHH

Peranto de UEA/yhteyshenkilö:

Tiina Kosunen ☎ 044 576 3314

✉ cefdelegito@esperanto.fi

Suomen Esperantoliiton jäsenyhdistykset

Helsingin Esperantoseura /

Esperanto-klubo de Helsinki

www.esperanto.fi Jäsenyhdistykset Helsinki

esperantohelsinki.wordpress.com

✉ esperanto@bastu.net

Oulun Esperantoseura /

Esperanto-societo en Oulu

www.esperanto.fi Jäsenyhdistykset Oulu

Aini Vääräniemi, Vääräjärventie 26 B,

93590 Vanhala

✉ aini.esperanto@gmail.com

Esperantoseura Antaäen r.y. /

Esperantosocieto Antaäen, Tampere

www.esperanto.fi Jäsenyhdistykset Tampere

✉ raimo.tuisku@saunalahti.fi, ☎ 050 411 5177

Turun Esperanto-yhdistys ry. /

Esperanto-Societo en Turku

www.esperanto.fi Jäsenyhdistykset Turku

✉ tiina.oittinen@pp.inet.fi, ☎ 050 549 4709

Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda

Esperantista Junulara Organizo (FEJO)

www.esperanto.fi Jäsenyhdistykset FEJO

✉ fejo@esperanto.fi

Iisalmen ja Ylä-Savon esperanton harrastajien

yhteyshenkilö: Onni Kauppinen, Lapinlahti.

✉ onni.kauppinen@gmail.com,

☎ 0500 813 530.

Esperanton harrastajia on edellä mainittujen paikkakuntien lisäksi myös mm. Hämeenlinnassa, Hyvinkäällä, Jyväskylässä, Lahdessa, Maarianhaminassa, Porissa, Raumalla, Salossa ja Taivalkoskella. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa liiton hallituksen jäseniltä.

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti myös Suomen Esperantoliiton jäseniä. Kullakin jäsenyhdistyksellä on oma jäsenmaksu. Jos paikkakunnallasi ei ole jäsenyhdistystä, voit myös liittyä liiton henkilöjäseneksi. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Vintra vizito en Somero

Somero estas urbeto meze de suda Finnlando – Helsinki, Tampere kaj Turku situas ĉiu je ĉirkaŭ cent kilometroj sude, norde kaj okcidente respektive. Centre ĝi situas ankaŭ en la Finnlanda esperanta historio. Rektoro *Joel Vilkki* (1899 – 1976) enkondukis en la liceon de Somero esperantan instru-esploreksperimenton.

La posteuloj de Vilkki donacis lian ampleksan bibliotekon al la urba biblioteko. Granda parto de tiuj verkoj trovis novajn posedantojn antaŭ kelkaj jaroj pere de EAF. La restantajn la hejmgregiona societo *Somero-seura* peris al EAF. Tiun trezoron mi kun *Robert Bogenschneider* meze de januaro transportis al Pori, kie sekva paŝo estas listigi ilin kiel brokantan butikon (krom



Esperantolernantoj el Somero. En la antaŭa vico maldekstre Joel Vilkki. Enmane li tenas la filon Simo Vilkki.

Fonto: Urba biblioteko de Somero, somero.finna.fi/Content/esperanto-kokoelma

arkivendajn valoraĵojn). – Varman dankon al la helpema *Terttu Tommila* en la societo.

Tuomo Grundström

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy huhtikuussa. Varmista aineistopäivä toimituksesta.

La venonta numero aperos en aprilo. Demandu la limdaton de la redakcio.

Osoite: Esperantolehti/EAF, s-posti/rete: eaf@esperanto.fi